Jongeren Esperanto Nieuws Jen

amikumu

Revoluciaj retejoj
Amikumu kaj Eklaboru
Ago-Semajno
verslag van Anneleen
Pli da precizeco en E-o
Pledo de Sinjoro Triangulkap el Kubo :-)
Dalai Lamao kaj Esperanto
li subtenas nian aferon!

Periodiek tijdschrift, jaargang 32, nummer 170, lente 2007
Perioda revuo, jarkolekto 32, numero 170, printempo 2007

ISSN 1380-9881

Colofon / kolofono

Jongeren Esperanto Nieuws (JEN) is een informatieblad voor Nederlandssprekende jongeren die belangstelling hebben voor de internationale taal Esperanto en voor taalproblemen in de wereld. Het is een gezamenlijke uitgave van de Nederlandse (NEJ) en Vlaamse (FLEJA) Esperantojongeren.

Het drukken en verzenden van de JEN wordt verzorgd door het *Esperanto-Centrum* te Antwerpen; de braille-versie wordt verzorgd door de Chr. Bibliotheek voor blinden en slechtzienden in Ermelo.

NEJ en FLEJA zijn de Nederlandse, resp. Vlaamse afdelingen van TEJO, *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*.

Een individueel lidmaatschap kost 20 EUR (tot 30 jaar). Giro 2717591 tnv ĉefdelegito de UEA in Rotterdam of giro 402-5510531-55 t.n.v Flandra Esperanto-Ligo te Antwerpen met vermelding van *Individua membro MJ-T*.

TEJO-leden ontvangen een jaarboek, de bladen TEJO-tutmonde en Kontakto, plus kortingen bij bijeenkomsten.

Naast bijdragen van medewerkers, zijn de artikels in deze JEN onder andere gebaseerd op berichten uit e-maillijsten (nejkajfleja, Esperanto en Belgio,...) en van websites (o.a. www.esperanto.se/NUN en www.gxangalo.com).

De uiterste datum voor het binnensturen van artikels voor JEN 171 is 15 sept. 2007

Vlaanderen (Int. toegangscode +32)

Redactie/Redakcio:
Yves Nevelsteen, Koning Albertlaan 147, 9000 Gent. Tel. 09/3307156
yves.nevelsteen@gmail.com

Administratie en informatie / Administrado kaj informado: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

Abonnementen en lidmaatschap
- Introductieabonnement (drie nummers) gratis
- Lidmaatschap FLEJA/FEL: 25 EUR (Omvat de tijdschriften Horizontaal en JEN)
- Abonnement op JEN: 9 EUR
- Steunende leden die 30 EUR of meer bijdragen, ontvangen ook JEN.

Argenta-rekening / Ĝirkonto:
979-6339610-83 t.a.v. de Vlaamse Esperanto Jongeren, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

FLEJA-bestuur / FLEJA-estraro:
- Yves Nevelsteen (voorzitter/prezidanto)
- Heidi Goes (ondervoorzitter/vicprezidanto) heidi_goes@yahoo.com
- Yannick Vercammen (secretaris/sekretario) yannickvercammen@telenet.be
- Björn Claes (penningmeester / kasisto) bjornclaes@belgacom.net
- Nataliya Chumak (bestuurslid/estrarano) nataliya.chumak@belgacom.net
- Carsten Mischke (bestuurslid/estrarano) batalanto@yahoo.de

E-post en www / retpoŝto kaj ttt:
e-post: fleja@esperanto.be
internet: http://www.esperanto.be/jongeren
http://www.esperanto.be/junuloj

Nederland (Int. toegangscode: +31)

Administratie en informatie / Administrado kaj informado: Fabien van Mook, Sophoclesstraat 121, 3076 AL Rotterdam, Tel.: +31-10-2 91 71 51 fabien@galerio.org

Abonnementen en lidmaatschap
- Introductieabonnement Jen (1/2 jaar): gratis Enkonduka abono Jen (duona jaro): senpage
- Lidmaatschap NEJ per jaar (incl. Jen): Tot 20 jaar: 11,50 EUR **/** Vanaf 20 jaar: 14,50 EUR
- Abonnement op JEN: 9 EUR
- Donateurs die 14,50 EUR of meer bijdragen, ontvangen ook JEN.

Girorekening / Ĝirkonto:
719930 t.n.v. Nederlanda Esperanto-Junularo, Amsterdam.

NEJ-bestuur / Estraro de NEJ:

Op dit ogenblik is er geen actief bestuur in Nederland. Daarom verschijnt de JEN daar uitzonderlijk niet in gedrukte vorm. Er is wel een PDF-versie beschikbaar. Neem contact op met de redactie als je iemand kent die de "digitale JEN" wenst te ontvangen.

En tiu ĉi momento ne ekzistas aktiva estraro en Nederlando. Tial escepte tie JEN ne aperas en presita formo. Ja haveblas PDF-versio. Kontaktu la redakcion se vi konas iun al kiu ni sendu "ciferecan JEN".

E-post en www / retpoŝto kaj ttt:
e-post: info@esperanto-jongeren.nl
internet: http://www.esperanto-jongeren.nl
mobiel / poŝtelefono: Tel.: 06-42507502

Provlegis Heidi Goes

V.U.: Yves NEVELSTEEN, Koning Albertlaan 147 – 9000 GENT (B)

La apero de interreto donas al la Esperantomovado novajn ŝancojn. Kiel ĉiam, ne ĉiuj (jam) konsentas pri la graveco de tiu ĉi aserto, sed mi persone forte kredas ke la sekvinda vojo por la movado estas internacia kunlaborado per interreto, kombinite kun renkontiĝoj.

Praktikaj "pruvoj" estas Vikipedio, la podkastoj de Varsovia Vento kaj du novaj, revoluciaj retejoj kiujn kreis teamo sub gvidado de Chuck Smith. Sub lia instigo kelkaj aktivuloj (inter alie mi) komune, pere de nova sistemo Google Docs, verkis artikolon kiu aperas krom en tiu ĉi JEN en la revuoj Kune (Germanio) kaj TEJO Tutmonde.

Malgraŭ tio ke multaj esperantistoj frue ekuzis interreton, iom daŭris antaŭ ol aktivuloj en nia movado ĝin ekuzis plenefike: kiel ilo por ŝpari tempon, kunigi fortojn kaj stimuli interkonatiĝon.

VENIS TIU ĈI MOMENTO

La retejoj ekzistas— ilin esploru, kunlaboru, ĝuu.

www.vikipedio.org
www.amikumu.com
www.eklaboru.com
www.viavento.org

Bonan legadon,

Yves

Inhoud Enhavo

Antaŭvorto	3
La estraro de FLEJA informas	4
Raporto PSKK 2006	5
Pledo por pli de precizeco en Esperanto	6-7
Ago-Semajno in Polen	8-10
Dalai Lamao disdonis Tinĉjon	11-12
Het Nederlands in de grondwet!	13
Primitiva renkontiĝo	14
"Falsaj amikoj" en Esperanto	15
Revoluciaj retejoj	16-17
Mojosa!	18
De wereld is weg van jou	19
Activiteitenkalender	20

La estraro de FLEJA informas

Manlibro pri Vikipedio
La manlibro estas komune verkita de kelkaj aktivaj "vikipediistoj". Ni presigis 250 ekzemplerojn ĉe la Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno. Inter alie dum la novjaraj renkontiĝoj IS kaj Ago-Semajno la manlibro estis senpage disdonita, dum okazis tie prelegoj kaj ekzercado. Pli ol 200 manlibroj jam estas transdonitaj (dankon al Carsten Mischke kaj Chuck Smith pro helpo!).

La presadon financis inter alie TEJO (kadre de fonduso Freŝa Vento) kaj malavara hungara mecenato. Se vi mem interesiĝas pri la broŝuro, kontaktu min. Al ĉiu kiu aĝas malpli ol 30 jaroj, senpage ni sendos ekzempleron (aŭ eĉ pliajn).

Plenkreskuloj povas akiri la broŝuron en la retbutiko de FEL (http://www.retbutiko.net/) kontraŭ 5 eŭroj. La profiton ni uzos por sendokostoj kaj... por presigi pli da manlibroj!

Korektita reeldono estas do planita. Sendu al mi viajn eventualajn komentojn (lingvajn kaj enhavajn) antaŭ la fino de februaro.

Subvencioj
Membroj de FLEJA povas kandidatiĝi por ricevi subvenciojn por iri al renkontiĝoj elektitaj de la estraro. Plej laste unu semajno post la peto, la estraro donas positivan aŭ negativan respondon al la kandidato. Mininumaj kondiĉoj por ricevi pozitivan respondon, estas unue ke la membro verkos raporton pri la renkontiĝo por JEN, kaj due ke ŝi aŭ li ne bone konas la E-kulturon.

Ekzemploj de eble subvenciotaj renkontiĝoj estas la Printempa Renkontiĝo de NEJ kaj la Malfermaj Tagoj de UEA. Kontaktu nin!

Interŝanĝo kun Pollando
La estraro decidis daŭrigi la interkonsenton ke du polaj junuloj rajtas senpage ĉeesti PSKK kondiĉe ke du flandraj junuloj rajtas senpage ĉeesti AS. Samkiel por la subvencioj, necesas kandidatiĝi ĉe la estraro de FLEJA por povi senpage ĉeesti AS.

PSKK 2007
Jam notu en viajn agendojn: PSKK 2007 okazos de la 31-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro en De Wiekslag en Zelem.

Estrarkunsidoj
Principe la estrarkunsidoj de FLEJA estas nepublikaj. Tamen, se vi interesiĝas pri la agado de nia asocio kaj volas ekesti aktiva, vi povas ĉe la estraro kandidatiĝi por ĉeesti la kunvenojn. Same la estraro mem povas inviti personojn. Ĉiam plimulto de la estraranoj devas konsenti.

Ĝenerala membrokunveno
Evidente la ĝeneralaj membrokunvenoj de FLEJA jes ja estas publikaj. Por havi la rajton voĉdoni, vi devas esti laŭleĝa membro. Sufiĉas sciigi tion al nia sekretario plej laste unu semajno antaŭ la ĝenerala membrokunveno.

Algemene vergadering
De algemene vergadering van de vzw Vlaamse Esperantojongeren vindt plaats op **3 maart 2007 in Kortrijk**. Wettelijke leden hebben op deze vergadering stemrecht. Volgens de statuten kiezen zij een nieuwe raad van bestuur. Deze raad beslist vervolgens onderling over de taakverdeling.

10u30: bezoek aan het Esperantofonds van de hoofdbibliotheek van Kortrijk, Leiestraat 30

14u: algemene vergadering in het Erfgoedhuis, Onze Lieve Vrouwestraat 45 (naast de Grote Markt).

Yves

PSKK 2006 – raporto
La Post-Somera Klaĉ-Kunveno celas antaŭ ĉio renkontiĝon kaj en freneze amika etoso ripozon de junularo. Dume sekvas programo de prezentadoj, prelegoj, kursetoj, bicikla kaj perpieda ekskursoj, babilado ĉe brulfajrejo, eblas provi literaturon ĉe riĉa libroservo, ekkoni novaĵojn de la esperantista movado kaj gustumi diversajn specojn de la belga biero :)

Dum PSKK ne la ideoj kaj ambicio de la organizantoj sed la partoprenantoj gravas. Respegulas tion zorgo pri la unuopuloj kaj pri la grupo kaj i.a bongusta manĝaĵo, kiun kuiras la organizantoj mem.

Ŝajne dank' al iamaniere modela interkompreniĝo kaj kunlaboro de la flandra kaj la nederlanda junularo la aranĝo de jaro al jaro progresas kaj fariĝas pli kaj pli internacia. Ĉi-foje apud la loka (belga kaj nederlanda) esperantistaro partoprenis PSKKon germanoj, francoj, poloj kaj eĉ junulo el Aŭstralio.

Ĝojis infanoj flue parolantaj en la lingvo internacia, intergeneracia etoso de junaj kaj malpli junaj familioj. La unusola manko, kiun mi rimarkis, estis nur la semajnfina daŭro, kiu al la gastoj de foraj landoj ne permesis ĝis fino satigi je esperantista etoso. Tion rimarkis ankaŭ la organizantoj, kiuj jam anoncis, ke PSKK venontjare plilongiĝos al kvar tagoj. Saĝa kaj plaĉa decido!

Irek

Pledo por pli da precizeco en Esperanto

Imagu ke vi faras kradrostadon kun geamikoj kaj alvenas policano, kiu diras al vi ke estas malpermesate fari fajron en arbaro. Tiam, se la kradrostadejo ne estas tro granda, vi povus diri: "Estimata sinjoro, laŭ la difino, arbaro estas loko en kiu troviĝas minimume 100 arboj. Tamen, en tiu ĉi loko troviĝas nur 99 arboj. Sekve nek lingve, nek jure povas temi pri arbaro." (Kompreneble vi prisilentu la fakton ke vi ĵus forhakis la 100-an arbon por elfari la fajron...) Supozeble la policano ne kontrolos la nombron kaj – kun iom da bonŝanco – lasos la aferon tiel. Bonan apetiton cetere!

La Matematika Kakgrupo (MK) de la Internacia Epidemio de Esperanto (IEI), sub la gvido de Sinjoro Triangulkap el Kubo, sekve pledas por la pliesplorado kaj finfine definitiva solvado de kelkaj tiklaj punktoj koncerne la uzadon de ekzemple –AR-, se ni volas ke Esperanto havu ŝancojn en internacia komunikado, kie kaj ekonomiaj, kaj polemikaj kaj juraj aferoj estas tre gravaj. Cetere, Esperanto sur tiu ĉi kampo montros revolucian kaj ekzemplan progreson al la tuta mondo, ĉar kontrolu la vorton 'arbaro' en diversaj nacilingvoj vortaroj, neniu el ili diros pri kiom da arboj entute temas!! Granda mistero! Ĉu vere ni estas Homo sapiens sapiens? Vivu la Homo sapiens verus sapiens.

En tiu ĉi kadro, necesas tuj atentigi pri la fakto ke la koncepto 'arb-ar-o' postulas ankoraŭ kelkajn pliajn kriteriojn, nome:
- la spaca aranĝo de la arboj: 100 arboj kune, sed kiuj staras en 1 longa vico, evidente ne povas esti "arbaro", sed iuspeca arbovico;
- la arboj estu ankoraŭ vivantaj, ĉar stako de 100 forhakitaj arboj ankaŭ ne plu estas vera "arbaro" en la ĝenerale akceptata senco, ĉar estas iom malfacile promeni inter ili, krom se ili kuŝas sur pluraj diversaj stakoj, sed tiam temas pri arbostakaro. Do la arboj ne estu horizontalaj, sed vertikalaj.

Ni konsideru ĉi-rilate cetere ke arboj kiuj kreskas sur montaro (sen diskuti tuj ĉi tie pri kiom da montoj minimume necesas por rajti paroli pri montaro) tamen – malgrau eventuala vidtrompo – tamen kreskas vertikale. Vidu la bildojn ĉi-apude.

Do, la difino de arbaro, laŭ s-ro Triangulkap devus esti: "minimume 100 kune sed ne en unu vico vertikale starantaj kaj vivantaj arboj". Tio bedaŭrinde ankoraŭ nenion precizigas pri la jenaj gravaj faktoroj:
- la maksimuma distanco inter la unuopaj arboj (kaze de maldense arbumita loko)
- la ebleco ke la arboj povus stari en 2 (paralelaj, ortaj au aliaj) vicoj de ambaŭ 50 arboj – au 2 vicoj de 34 arboj plus 1 vico de 33 arboj, ktp ktp.

- la maksimume permesata distanco inter tiuj respektivaj vicoj...

Sekve ankau necesas difini – kaze de nenature estiĝinta arbaro – la minimuman nombron de vicoj en tiu arbaro!

Meze dum tiu diskuto, fininta la lastan bieron, subite ekstaris S-ro Pilsen el Ĉehio – kiu cetere partoprenis la diskuton ĉefe ĉar haveblis senpaga biero – por atentigi ke la pli supre menciitaj difinoj povas rilati nur al "arbareto" kaj ne al "arbaro". Do, la 3-jara esplorado kaj enketado de S-ro Triangulkap montriĝis tute vanaj kaj li kolere eliris la salonon, suben lau la ŝtuparo – de kiu li nombris la diversajn ŝtupojn kaj hezitis ĉu ja estus entute ŝtuparo aŭ nur ŝtupareto...

Tre bedaŭrinde la aliaj partoprenintoj de la Kakkunsido konkludis ke mankis kaj tempo kaj biero por definitive fiksi la kriteriojn ne nur por arbaro kaj arbarego, sed ankaŭ por montareto, montaro, montarego...

- "kaj ŝtuparo!!...", aldonis S-ro Triangulkap, kiu intertempe trankviliĝis kaj reiris al la kunsidejo.

Nu, finfine eble pli bonas tiel ĉi, ĉar se iam iu ministerio komencos fiksi regularojn pri junularaj asocioj, iuj kiuj havas malpli ol 100 membroj povus ekhavi ne nur lingvajn, sed ankaŭ jurajn problemojn...

Lode



Fig.1: arboj ŝajne ne kreskas vertikale



Fig.2: arboj tamen kreskas vertikale!

Ago-Semajno in Polen

Na een 24-uur lange reis, eerst doorheen het volgebouwde België en Duitsland en nadien door het prachtige Poolse landschap, kwam ik moe, maar vol verwachting aan op AS of voluit Ago-Semajno. Doe-week, de naam alleen al, dat beloofde een drukke week te worden.

Hoewel het niet mijn eerste congres is (na ongeveer drie jaar actief bezig te zijn met Esperanto, zou dit mijn zevende congres worden!), blijft het natuurlijk altijd een beetje afwachten wat er weer gaat gebeuren en vooral, wie je na lange tijd nog eens gaat terugzien.

Ik werd met open armen ontvangen en meteen kon ik mijn spulletjes op mijn kamer zetten, ik bleek te logeren in een kamer met een Chinees meisje en twee Oekraïense meisjes. Daarna kon het welkomgekus beginnen.

Die avond zou de officiële opening zijn met kennismakingsspelletjes. Normaal doe ik daar nooit aan mee, omdat ik officiële dingen nu eenmaal niet zo boeiend vind, maar blijkbaar had iemand mij kunnen overtuigen om toch mee te gaan.

Men stelde de medewerkers van AS voor en ook de plaatselijke club van Esperantisten was aanwezig. Zij verzorgden de avondprogramma's en de excursie.

Die avond gebeurde er niet veel in de discotheek en de bar was onvindbaar verstopt, maar tijdens mijn zoektocht naar iets om de grote dorst te lessen, passeerde ik voorbij een kamer waaruit muziek weerklonk.

Blijkbaar had ik Kim gevonden, een accordeonist, die aan het improviseren was, samen met iemand op een plastieken tamtam. Binnen zaten verschillende mensen een beetje verzonken in hun eigen gedachten ofwel vrolijk meewiegend op de muziek.

Het zag er heel gezellig uit, dus besloot ik ook naar binnen te gaan. Voor mij was het alleszins onmogelijk om rustig te blijven zitten op dat soort muziek. Het zou één van de knuste avonden worden die ik al meemaakte op congres. De muziek bleef maar duren en we haalden er ook kaarsjes bij om het nog wat gezelliger te maken.

De volgende dag sliep ik lang uit, dus ik weet niet wat er op het dagprogramma stond, maar 's avonds waren we uitgenodigd om naar traditionele Poolse kerst-dansen te gaan kijken. Eerst speelden schattige kindjes een kerstverhaal, met mooie verkleedkleren en sommigen in traditionele klederdracht. Ze begeleidden alles zelf met violen en trompetten en zongen en

dansten.

Daarna kwamen er nog volwassen dansers, ook in hand-gemaakte traditionele kleren optreden. Achteraf werden we verrast met een receptie waar we typische Poolse kaaskoeken konden eten. Intussen konden degenen die wilden de dans-technieken en -pasjes aanleren.

Tot laat in de nacht werd er nog gitaar en accordeon gespeeld.
's Morgens vertrokken we op daguitstap met de bus, het werd een toffe uitstap, waarop we ruimschoots de kans kregen de anderen te bekogelen met versgevallen sneeuw.

We bezochten een Grieks kerkje, een museumpje en een dorpje dat bekend was om zijn water-bronnen. Nadien gingen we een soort warme honingwijn drinken, die meer dan welkom was!
Op oudejaarsdag zelf viel er niet veel te beleven, de mensen sliepen wat uit en degenen die

wakker waren, tutten zich op of hielpen met het maken van een overheerlijk buffet.

Vanaf 12 uur ’s middags tot 12 uur de volgende dag, kreeg iedereen de kans om elk uur te gaan kussen, aangezien we natuurlijk elk nieuwjaar van over de hele wereld moesten vieren. Om 23 uur was er al een groot Oekraïens feest, aangezien de Oekraïniërs met redelijk veel waren.

In zijn geheel werd het een spetterend en ook een laat feestje, waarop we ons konden uitleven in de disco en veeeeeeel kussen uitdeelden.

Op nieuwjaarsdag vertrokken er al enkelen huiswaarts en zij die bleven, improviseerden een eigen feestje, waarbij een oosters hoekje werd ingericht. Hier dronken we thee en werd gitaar gespeeld tot in de vroege uurtjes.

Om vijf uur ’s morgens nam ook ik de trein weer naar huis, met een goed gevoel, veel e-mail-adressen van de geweldige mensen die ik weer was tegen-gekomen uit veel verschillende landen en een hoop energie om de volgende maanden tegen de saaiheid van de examenperiode opgewassen te zijn.

Anneleen

Dalai-lamao disdonis Tinĉjon en Esperanto



Dalai-lamao, la spirita gvidanto de multaj tibetaj budhanoj, ĉi-jare transdonis la premion "Lumo de Vero" al fondaĵo Hergé pro la bildstria verko "Tinĉjo en Tibeto".

Lige kun la ceremonio, Dalai-lamao disdonis al la ĉeestantoj ekzemplerojn de la esperant-lingva eldono de la verko.

Esperantistoj ŝajne ne ĉeestis dum la ceremonio, sed laŭ neesperantista ĉeestinto, la esperanta versio estis disdonita "kun la espero, ke iam ni ĉiuj parolos la saman lingvon". La premio "Lumo de vero" estas disdonata ĉiujare de la Internacia Kampanjo por Tibeto. Ĝin ricevas personoj kaj institucioj, kiuj faris "signifajn kontribuojn al la tibeta batalo por homaj rajtoj kaj libereco".

Ĉi-jare estis du premiitoj. Unu estis la sudafrika ĉefepiskopo Desmond Tutu, kiu ricevis la distingon pro sia strebado fortigi la rajtojn de subprematoj, kaj pro sia klara subteno al la rajtoj de tibetanoj.

La alia premiito ĉi-jare estis la fondaĵo Hergé, kiu estis premiita pro ĝia subteno al la heredaĵo de la forpasinta aŭtoro de *Tinĉjo en Tibeto*, Georges Remi (alinome Hergé). La franclingva versio de la verko estis publikigita en 1959, en la sama jaro kiam ĉinaj trupoj komplete ekregis Tibeton kaj

Dalai-lamao disdonis Tinĉjon en Esperanto

Dalai-lamao fuĝis el Tibeto al Barato.

Tinĉjo en Tibeto estas unu el la plej popularaj verkoj en la mondfama serio de bildstrioj pri la knabeca ĵurnalisto. La libro rakontas pri la amikeco inter Tinĉjo kaj la tibeta knabo Chang, kiu travivis flugakcidenton en la montaro. Kiam Tinĉjo venas savi sian amikon, li renkontas tibetajn monaĥojn kaj la mitan neĝoviron.

La premio, en formo de tibeta buter-lanterno, estis akceptita de la vidvino de Hergé, Fanny Rodwell. Grava kialo de la premiado estis la sinteno de Hergé en rilatoj kun ĉina eldonisto de Tinĉjo. Kiam la verko aperis ĉinlingve, ĝi estis nomita *Tinĉjo en ĉina Tibeto*. Hergé kaj lia eldonejo protestis, kaj la ĉina flanko konsentis aperigi la verkon kun la origina titolo.

Ne nur Dalai-lamao disdonis ekzemplerojn de la verko al la ĉeestantoj, ankaŭ ekster la salono haveblis senpagaj Tinĉjo-libroj. Sed nur en Esperanto.

La premia ceremonio okazis en Bruselo jam en junio, kaj pri ĝi raportis multaj mondaj amas-komunikiloj. Tamen ĝis nun ne estis vaste konate inter esperantistoj, ke oni specife elektis ĝuste la esperantlingvan eldonon por disdonado. La esperanta eldono de *Tinĉjo en Tibeto* aperis ĉe la eldonejo Casterman en 2005.

Fonto: http://www.liberafolio.org/2006/dalailamao/

Dances with wolves

Senlime ĵus faris subtekstojn por la filmo 'Dances with wolves' = "Dancas Kun La Lupoj", mita verko de Kevin Costner.

Respektante ĉiujn rajtojn, eblas nun diversmaniere spekti la subtek-stojn samtempe kun la filmo (eĉ kelkaj novaj salon-legiloj nun kapa-blas tion fari!).

Jean-Marie Jacques de Senlime (http://www.senlime.org) petas al tiuj kiuj eventuale volas helpi lin traduki pluajn surskribojn (tre agrabla kaj pliriĉiga aktiveco) kontakti lin pere de jacques@senlime.org

informis *Herman Deceuninck*

Het Nederlands in de grondwet!

Taalpost is een e-mailnieuwsbrief die alle taalliefhebbers snel en goed informeert over de taalactualiteit. Taalpost is een gezamenlijk initiatief van het Genootschap Onze Taal en Van Dale. De redactie van Taalpost bestaat uit Ludo Permentier (Van Dale) en Marc van Oostendorp (Onze Taal), een esperantist.

Volgend artikel verscheen onlangs in Taalpost (uittreksel):

DEN HAAG (GPD) - Hij is 'blij' met het voornemen om de Nederlandse taal in de Grondwet vast te leggen als bestuurs-, cultuur- en omgangstaal, zoals in het conceptregeerakkoord staat. Maar Peter Smulders, directeur van het Genootschap Onze Taal, is tegelijkertijd verbaasd. ,,Het is opmerkelijk nieuws. Het heeft me verrast. Ik had het niet op de politieke agenda verwacht. Jarenlang is er vanuit allerlei hoeken voor gepleit. Maar kennelijk is het nu onder invloed van Rouvoet wel voor elkaar gekomen.''

Els Ruijsendaal, hoofdredacteur van Neerlandia, het blad van het Algemeen-Nederlands Verbond, noemt opname van het Nederlands als officiële landstaal in de Grondwet absoluut nodig. ,,Europa beschermt wel de minderheidstalen, maar de landstaal moeten de staten zelf beschermen.'' De meeste landen van de Europese Unie hebben hun talen al in de Grondwet opgenomen of in andere wettelijke regelingen, zoals België. Ruijsendaal: ,,In de Grondwet zijn wel allerlei zaken als briefgeheim en vrijheid van meningsuiting geregeld, maar in welke taal dat allemaal moet, staat er niet in.''

Er wordt al geruime tijd gepleit voor de verankering van het Nederlands als rijkstaal nummer één in de Grondwet. De lobby startte in het vroege voorjaar van 1997 toen CDA en GPV, één van de voorlopers van Rouvoets Christen-Unie, met een voorstel daartoe kwamen. De Paarse regeringspartijen vonden dat destijds sympathiek, maar onnodig en overbodig.

Het is overigens nog afwachten wat opname van het Nederlands in de Grondwet in de praktijk zal betekenen, meent Smulders van Onze Taal. ,,Dat is erg afhankelijk van de vraag of het een puur papieren maatregel blijft of ook echt inhoud krijgt, beleid dat erop is gericht om het Nederlands te bevorderen. De overheid is zelf bezig het Engels als onderwijstaal in te voeren. Het mag niet alleen een papieren letter blijven, maar moet ook leiden tot actief beleid, zoals de terugkeer van het Nederlands op de universiteiten. Dat zal nog niet zo eenvoudig zijn. Het is de vraag of men zich daar zal laten terugfluiten.''

PR 2007!
Het leek er even op dat 2007 een PR-loos jaar zou gaan worden, maar niks is minder waar! Hoewel in een heel andere opzet, en niet meer onder de naam 'Printempa Renkontiĝo', maar 'Primitiva Renkontiĝo', toch weer een Nederlandse Esperanto-bijeenkomst met Hemelvaart.

Waar:
In Den Dolder, in een groot kraakpand aan de rand van het bos. Den Dolder ligt tussen Amersfoort en Utrecht en is goed bereikbaar met het openbaar verboer

Wanneer:
Van woensdagavond (16 mei) tot en met zondag de 20ste.

Wat:
Alles wat in ons hoofd opkomt, zolang het niet teveel organisatie of geld vergt… Tot nu toe bedacht: Boswandelingen en -spelletjes (speurtochten! levend stratego! boompje verwisselen!), excursie naar Utrecht en/of Amersfoort, pannenkoeken eten in pannenkoekendorp Lage Vuursche, bij een bioboerderij langs, 's nachts stiekem golfen op de golfbaan, workshop over permacultuur, (heel misschien) de Franse rappers van Pafklik, beginners-cursus, bij mooi weer slapen in het bos, Paleis Soestdijk bekijken (nou ja, van de buiten-kant misschien...) binnen-spelletjes, gufujo, bar, samen koken, disco....

Thema:
Niet alleen de organisatie is nogal primitief, ook de lokatie. Er is geen vaste stroom, alleen zonne-panelen en een windmolen. Ook een waterleiding ontbreekt: douchen doe je door een ketel regenwater op te warmen, drinkwater halen we bij de buren. Als het koud is gaan de hout-kachels aan, boodschappen doen we met de bakfiets.

Gezocht:
enthousiaste mensen die willen helpen het PR nieuwe stijl te organiseren. Ook ideen, tips en praktische hulp ter plekke zijn welkom!

Stuur een mailtje naar wendiewendie@hotmail.com , ook om je vast aan te melden.

Finjo en Wendie

http://www.esperanto-jongeren.nl/pr2007/

Mi antaŭ kelkaj jaroj ĉeestis kelkajn prelegojn de Marcel Delforge kun la titolo “Falsaj amikoj en Esperanto”. Kvankam laŭ la ekzakta difino ne ĉiuj vortoj sur tiu ĉi paĝo estas “falsaj amikoj”, mi pensis ke al kelkaj legantoj de JEN plaĉas kompari vortetojn. Mi elektis la laŭ mi plej interesajn.

AKCEPTI gastojn-monon…
RICEVI leteron, vangofrapon – bebo ricevis sian unuan denton

AKURATECO esti preciza en la difinita tempo
ĜUSTECO en sia kalkulo ĝusta
JUSTECO justico – justa justeco de tiu afero estas senduba.
PRAVA opinio konforme al la vero

BALOTI voĉdoni per balotiloj
VOĈDONI por kiu vi voĉdonis?
ELEKTI oni elektis lin kiel vartiston de la princo !

TABLO (meblo)
TABELO (kotiztabelo)
TABULO (nigra tabulo)
TAVOLO karbo-tavolo

DEFENDI sian projekton
MALPERMESI fumi en trinkejoj

DEVENI el kiu lando vi devenas?
DIVENI divenu ! :-)

DOLORI mia piedo doloras
SUFERI pro diabeto(sukermalsano)
SUFERIGI bestojn
DONI garantion

OFERTI ĉokoladon
OFERI al la dioj
PREZENTI aktoron
PROPONI solvon.

EBLIGI fari, ke io estu ebla
PERMESI konsenti ke iu libere faru ion

EFEKTO la muziko estis la ĉefa efekto de la teatraĵo
EFIKO ripozo mirinde efikis

GARDI zorgi kontraŭ malamikoj
KONSERVI nutraĵojn

GRANATO frukto
GRENATO mineralo
GRENADO bombeto
GRENETO malgranda greno

POLVO ekzemple : karbo-polvo
PULVO por kanono
PELVO vazo por likvaĵoj

REVI imagi tion, kion oni deziras
SONĜI dumnokte,…

INTERESO pri projekto
INTEREZO 5 % da interezo

KONDUKI oni kondukis min ĝis mia domo
KONDUTI havi bonan konduton

MINO karbomino / milita bombo
MIENO esprima aspekto de la visaĝo

Yves
Laŭ verko de André Cherpillod

Revoluciaj retejoj

Dum la pasintaj monatoj, ni lanĉis du novajn retejojn: eklaboru.com, kaj amikumu.com. Resume, en eklaboru oni povas trovi laboron aŭ laboranton. Per amikumu, oni povas trovi lokajn esperantistojn kaj alŝuti fotojn por ke la tuta mondo povu vidi ilin.

Nia celo iusence estas ŝanĝi la manieron en kiu esperantistoj vidas sian komunumon. Oni ĝenerale ne atendas profesiajn retejojn en Esperantio, ĉar ili estas pli malpli faratj de volontuloj. Oni ankaŭ ne atendas ke oni povu labori per Esperanto... oni kutime lernas Esperanton simple por amikumi.

Eklaboru

"Esperanto ne estas lingvo de komerco". Ĉu? Se ni estas honestaj, ankoraŭ ne... Eklaboru volas ŝanĝi tion. Esperantistoj estas ofte tre entreprenemaj homoj kun tre apartaj hobioj kaj fakoj. Ĉefe rilate tradukado kaj komputilado, tre indas serĉi spertulojn en Esperantio. Ĝis nun tio ĉi ne estis facila tasko. Kiel kontakti la esperantistaron pri tio? Ĉu per la revuo *Esperanto*? Eblas, sed certe ne estas la plej oportuna maniero. Sama problemo ekzistis por trovi volontulon por ekzemple labori kiel TEJO-volontulo aŭ por redakti Esperanto-revuon.

En la retejo eklaboru.com entreprenistoj kaj asocioj povas sciigi ke ili serĉas kunlaboranton. Estas eblo indiki ĉu la laboro estas pagata aŭ ne, ĉu temas pri laboro per interreto aŭ ne ktp. Esperantisto kiu volas labori, ĉu partatempe, ĉu plentempe - ĉu pagite aŭ ne, povas alŝuti vivresumon.

Finfine ankaŭ Esperantio disponas je profesia laborretejo - ni disvastigu kaj uzu ĝin!

Amikumu

Ĉar momente Esperanton oni ĉefe lernas por amikumi, ni kreis ankaŭ amikumu.com. Ni konstatis ke ne ĉiam facilas ekhavi kontaktojn kun esperantistoj, ĉu en propra regiono, ĉu kun samaj interesoj. Momente ĉefe post longa aktivado ene de la movado kaj ĉefe per renkontiĝoj, eblas ekhavi internacian amikaron. Ni volas plifaciligi la interkonatiĝon kaj plene profiti de la avantaĝoj de interreto.

En Amikumu ĉiu povas krei profilon en kiu li aŭ ŝi prezentas sin. Vi povas i.a. aldoni al tiu ĉi profilo pri kio vi interesiĝas kaj alŝuti fotojn. Poste eblas en Amikumu serĉi esperantistojn, ekzemple laŭ interesoj, kaj aldoni certan personon - amikon - al via konto. Similas al la ebloj de retejoj kiel MySpace aŭ LiveJournal.

Verŝajne la plej interesa funkcio en Amikumu estas la povo vidi ĉiujn uzantojn sur Google Maps. Tiel oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo vidante kie homoj loĝas.

Eĉ estas paĝo kiu montras al vi liston de uzantoj ordigitaj laŭ proksimeco de vi, do vi povas malkovri nekonatajn esperantistojn eĉ en via urbo!

Estas multaj planoj pliampleksigi la eblojn de Amikumu. Ekzemple ni intencas doni al vi la eblon krei grupojn (alternativon al Jahugrupoj), vikiojn, blogojn, forumojn kaj babilejojn. Sendu al ni viajn sugestojn!

La teamoj de
Eklaboru kaj Amikumu

Esperantomovado—Mojosa!

Mojosa estas adjektivo en Esperanto (la originala kaj plej ofte renkontata formo de la radiko mojos') kun signifo egala al tiu de la angla vorto *cool* en ties signifo de moderna, bonega.

Temas pri mallongigo de triradika kunmetaĵo "modern-junstila". Ĝi estas parto de la junulara esperanto-slango de la 2000-aj jaroj.

Historio, deveno kaj signifo
La vorto ekestis en 2003 dum la TEJK-seminario en Sötör (Hungario) per iniciato de Gregor Hinker, Felix Zesch kaj ceteraj seminarianoj, kiam oni konstatis la fortan mankon de esperanto-vorto kiu signifus la samon kiel la angla vorto *cool*, sed ne en la laŭ-vorta senco (freŝa), sed en alia (moderna, bonega).

Malkiel multaj aliaj proponoj pri slangaĵoj, ĝi ekuziĝis kaj enradikiĝis, kvankam ĝis nun preskaŭ nure inter la junularo. La seminaria laborgrupo konstatis, ke la esenco de la angla vorto *cool* tradukeblas kiel modern-junstila (emfazante tiel al moderneco, juneco kaj stileco), sed ĉar tion oni konstatis tro komplika, tro longa kaj ne tro "cool-a", oni anstataŭe prenis la komencajn literojn de ĉiu de la tri radikoj (modern' - jun' - stil') kaj el ili kreis mallongigon MJS, kiu (laŭ sia po-litera elparolo) provizis bazon por la nova adjektivo mojosa.
Ekzistantaj klarigoj pri tio, kial ne eblis iu pli rekta esperantigo de la vorto cool kialigas, ke fonetika transpreno *kula* kreus konfuzon kun kuloj kaj transpreno de la baza signifo *frida* ne taŭgas pro tio, ke ĝi kaŭzus ambiguecon.

Derivaĵoj
Ĉar la vorto mojosa estas ĝenerale taksata kiel adjektivo derivita de radiko mojos', oni foje renkontas ankaŭ aliajn derivaĵojn faritajn de tiu sama radiko - ekzemple mojosega (=ege mojosa), mojosi (=esti mojosa), mojose (=per mojosa maniero) aŭ mojosulo (=mojosa ulo). Tamen ilia uzo ne tiom oftas kiel la uzo de la originala vorto.

Ĝenerala uzo
Nuntempe la vorto mojosa (kaj sufiĉe malpli ofte ĝiaj derivaĵoj) trovas oftan uzon dum esperanto-konversacioj, precipe ene de la junulara medio. Male, plejmulto de la pli aĝaj esperantistoj neniam konatiĝis kun la signifo de tiu vorto. La reago kaj ĝia akcepto inter tiu ĉi grupo tamen ĝenerale estas milda, komprenema kaj multe pli pozitiva ol la reago al aliaj similaj eroj de la junulara slango (ekzemple la eksperimenta prepozicio "na").

Atentu!
La artikolo ne finiĝis. Plulegu en la libera enciklopedio Vikipedio je *www.vikipedio.org/wiki/Mojosa*

VIA vrijwilligerswerk
Vzw VIA organiseert vrijwilligerswerk in binnen- en buitenland. Ook dit jaar kan je weer een zinen sfeervolle vakantie beleven.

De brochure 2007 met het grote aanbod aan werkkampen, zo'n 1000 vrijwilligersprojecten verspreid over de hele wereld, kan je vanaf NU bestellen bij VIA!

VIA is de Vlaamse tak van SCI (Service Civil International), een wereldwijd netwerk waarin internationale solidariteit centraal staat. Vanuit deze visie organiseert VIA werkkampen om mensen met verschillende achtergronden en culturen met elkaar in contact te brengen en zo tot een interculturele uitwisseling te komen.

INTERNATIONALE VRIJWILLIGERSPROJECTEN OVER HEEL DE WERELD

Tijdens zo'n internationaal werkkamp werk je gedurende twee à drie weken met een internationale groep vrijwilligers mee binnen een organisatie die je boeiend vindt.

Je kan er vrijwilligerswerk doen rond allerhande thema's. Ecologie, solidariteit met het Zuiden, sociaal achtergestelde mensen, vredesopvoeding, kunst en cultuur,… dit zijn slechts enkele van de vele mogelijkheden.

Concreet kan het dan bijvoorbeeld gaan over een natuurbeschermingsproject in Wit-Rusland, het renoveren van een achtergestelde stadswijk in Italië, een traditioneel lampionnenfeest mee organiseren in een dorpje in Japan, activiteiten begeleiden voor kinderen met een handicap in Turkije, de realiteit van de Palestijnse bevolking leren kennen, deelnemen aan een fietstocht voor de vrede in de Verenigde Staten, meewerken op een biodynamische boerderij in Finland, een weg aanleggen in een dorpje in Ghana, straatkinderen opvangen in een stad in Honduras, en nog véél meer. ..

Iedereen vanaf 17 jaar kan deelnemen.

Bestel nu de grote 'Werkkampenbrochure 2007'
Je kan ze bestellen voor 5 € (na ontvangst te betalen) bij VIA, Draakstraat 37, 2018 Antwerpen of op het telefoonnummer 03/235.94.19 of 03/235.92.21. Faxen of e-mailen kan ook: 03/235.29.73 en VIA@VIAvzw.be.

En natuurlijk kan je nu reeds een kijkje nemen op de VIA-website: www.VIAvzw.be

Kalendaro

Activiteitenkalender lente-zomer 2007

MARTO

Vizito al la biblioteko + ĝenerala membrokunveno de FLEJA
sabato la 3-a **Kortrijk** (Belgio)
Detalojn pri tiu ĉi evento vi trovos je paĝo 5.

Esperanto studieweekeinde
16/03 ĝis 18/03 **Almelo** (Nederlando)
Info: http://www.esperanto-nederland.nl/bonvenon/studweek.php

MAJO

Primitiva Renkontiĝo
16/05 ĝis 20/05 **Den Dolder** (Nederlando)
Info: http://www.esperanto-jongeren.nl/pr2007/

JUNIO

Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA
sabato la 2-a **Rotterdam** (Nederlando)

JULIO

Internacia Junulara Semajno
19/07 ĝis 25/07 **Hungario**
Info: http://www.ijs.hu/

Kultura Esperanto-Festivalo
27/07 ĝis 03/08 **Helsingør** (Danio)
Info: http://kef.saluton.dk/

Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio
28/07 ĝis 04/08 **Maribor** (Slovenio)
Info: http://www.esperanto-maribor.si/

AŬGUSTO

Festo
20/08 ĝis 27/08 **Montoire-sur-le-Loir** (Francio)
Info: http://esperanto-jeunes.org/festo2007/

Deze kalender is een selectie! Meer info over bijeenkomsten vind je onder andere in de kalenders van het Hongaarse Eventoj http://www.eventoj.hu/ en in deze van NEJ http://www.esperanto-jongeren.nl/aktiviteiten.php